

9222. 2014
entru: 915

Informilo

MONATA REVUO DE FLANDRA ESPERANTO-LIGO
MAANDBLAD VAN DE VLAAMSE ESPERANTOBOND

RESPONSOR: JAN BOVENEERD, SPEELTUINLAAN 14, B-2510 MORTSEL
RESPONSOR: SPONDECA ELDONANTO:

JARKOLEKTO 4 N° 3 APR. 1984
JAARGANG

Al nia nova prezidanto Ivo Durwael niajn olej sincerajn dezirojn pri sukceso kaj fruktodona laboro dum lia jús komenciĝinta ofic-periodo.

Atentu bone, bonvolu

Dum la semajno post la 10-a de junio vizitos Belgion, D-ro Tyburcjusz TYBLEWSKI el Pollando.

Li dum la sabato 16-a kaj dimanĉo 17-a de junio gvidos en LA VERDA STELO stud-semajnfinojn pri "PSIKOLOGIAJ LEĜOJ DE INTERPERSONAJ RILATOJ"

D-ro Tyblewski pretas prelegi ekde la 10-a de junio ankaŭ en aliaj grupoj.

Interesitoj bonvolu kontaktigi kun Ivo Durwael, P. Gilsonlaan 5, 2520 Edegem tel 03/440 30 92.

Al Ges-roj DEMONTY-SEGHERS naskiĝis filino - Catherine - je 10 04 1984.

Al la gepatroj sincerajn gratulojn

al Catherine sanon, prosperon, feliĉon

estas niaj elkoraj deziroj.

VENONTA ESTRARKUNSIDO : SABATO 5-A DE MAJO 1984 EKDE 14.00 H.

I N F O R M I L O . Kadrogazeto de FLANDRA ESPERANTOLIGO
 Frankrijklei 140, 2000 ANTWERPEN
 Telefono 03/234 34 00

Jarabono : BF 150,- Kontoj : 402-5510531-55 kaj 000-0265338-43

Prezidanto : Ivo DURWAEL, Paul Gilsonlaan 5
 2520 EDEGEM 03/440 30 92

Sekretario : Jan BOVENDEERD, Speeltuinaan 14
 2510 MORTSEL 03/449 50 06

Financoj : Erik D'HONDT, Wilgstraat 25 A
 9440 EREMBODEGEM 053/77 44 97

Paul PEERAERTS, Baron Dhanislaan 13
 2000 ANTWERPEN

Informado : Edward SYMOENS, Putsesteenweg 131 A
 2180 KALMTHOUT 03/666 62 66

Intergrupa agado : Hilde VAN INGELGEM, Arbeidstraat 21
 9300 AALST 053/70 50 11

Trees DOOMS, Baron Dhanislaan 13
 2000 ANTWERPEN

Junularo : Kristin TYTGAT, St. Hathebrandstraat 8
 2510 MORTSEL 03/449 50 24

Kadrokursoj : André STAES, Jan Denucéstraat 1/198
 2020 ANTWERPEN

Literaturo/eldonoj : Christian DECLERCK, Amerikalei 135/2
 2000 ANTWERPEN

Gazetara servo : Herman k. Annie DECEUNINCK-BOLLAERT
 Lusthuizenlaan 1 b. 4, 1500 HALLE 02/360 17 22

Sciencoj : Wim DE SMET, Hertendreef 12
 2180 KALMTHOUT 03/666 99 49

Provincaj respondeculoj :

Brabanto : M. Th. HENQUINEZ 016/23 61 90
 Lipsestraat 166, 2991 TILDONK

Limburgo : Guido SCHROEYERS 011/53 64 10
 Helzoldstraat 113, 3558 HELCHTEREN

Okc. Flandrujo : vakas

PROTOKOLO

pri la administrantara kunsido de sabato 24-a da marto 1984 en Antverpeno

Ĉeestas : P-ro A. Beckers, Albert Claesen, Guido Claesen, Erik D'Hondt,
 Ivo Durwael, Jan Hanssen, Paul Peeraerts, Edward Symoens, Cesar
 Vanbiervliet, Hilde Van Ingelgem, Jules Verstraeten, Jan Bovendeerd.

Petis senkulpigon : Willy Huybrechts.

Prezidas : Edward Symoens

Protokolas : Jan Bovendeerd.

Komenco : 10.30 h.

T A G O R D O

1. Ĉar tiu ĉi kunsido estas la unua administrantara de FEL, ankoraŭ ne estas protokolo aprobenda.

2. Grupa agado.

JB donas superrigardon (vidu la sekretarian raporton de la ĝenerala kunsido) sed atentigas, ke ĝi ne havas veran valoron, ĉar sendube estas grupoj kiuj ne raportis sed tamen aktivis. Ekzemple la ERIKEJO - Kalmthout. ES bedaŭras ke el lia grupo ne venis raportoj, sed tio ne rekte dependas de la prezidanto.

2.bis : Ivo Durwael atentigas pri invito de la Kultura Konsilantaro de la urbo Antverpeno kaj scivolas pri kiu reprezentas FEL.

JB informas ke oficiale FEL estas reprezentata de Paul Peeraerts kun Gerd Jacques kiel anstataŭanto, sed ke nek Paul, nek Gerd ĝis nun povis partopreni la kunsidojn. Post la pritraktado de tiu problemo en la januara estrarkunsido, JB ricevis telefonvokon de Anne Tilmont, kiu sin deklaris preta kombini la reprezentadon de FEL kun tiu de LA VERDA STELO, kies reprezentanto ŝi estas kun André Staes kiel anstataŭanto. Tamen ŝajnas ke tio ne eblas, almenaŭ ne tiel simple. André Staes konfirmas sian pretecon reprezenti FEL. Paul priesploras la eblecojn por tion realigi.

3. Provinca agado.

JB atentigas pri la klopodoj faritaj en Antverpeno fare de LA VERDA STELO kadre de la ĝenerala membropolitiko. LVS nome daŭre sendis sian informbultenon "Esperanto Novaĵoj" kaj estonte sendos ESPERANTO PANORAMA-n al ĉiuj membroj kaj ankoraŭ-ne-renovigintoj de sia kotizo samkiel al informpetintoj de la lastaj jaroj. Ĉu la afero sukcesos, elmontros la estonto. ID aldonas, ke depost la UK en 1982 la kursoj sukcesis, sed ne pli bone ol antaŭe. Tamen la rapidkursoj de Petro De Smedt havis bonan rezultaton eĉ sen multe brui en la gazetaro.

ES substrekas la malpliigon sur kultura nivelo en la tuta socio eĉ en tuta Okcident-Eŭropo. Pri tiu fenomeno li alvokas al profunda pripensado kaj pritraktado en la planita kolokvo en septembro.

4.1. Propono de la grupaj administrantoj.

Bonvole vidu la kompletan liston en la Organigramo.

4.2. Al la grupa administrantaro aldonigu la funkciuloj de UEA, nome

- la direktoro de FEL : Paul Peeraerts
- la direktoro de EEC : Anne Tilmont
- la direktoro de SONORILO : Monique Vereecken
- la direktoro de UEA en Belgio : Paul Peeraerts
- la ĉefdelegito de UEA : Andrée Orsolini
- la komitatanoj A de UEA : Edward Symoens kaj Lambertine Dreze
- la reprezentanto de FLEJA : Kristin Tytgat

4.3. Kooptado eblas ĝis 1/3 de la tuta administrantaro, nome 1/3 de 22 = 7

Proponiĝas jenaj :

- Hilde Van Ingelgem, Trees Dooms, Marc Van den Bempt, Jan Hanssen, Guido Claesen, Dirk De Weerd, Jan Bovendeerd

5. Financa programo

5.1. PP donas ĝeneralan eksplikon proponante detalan raportadon en la ĝenerala kunsido.

El liaj eksplikoj ni retenu, ke la evoluo estas iom pli bona, kvankam la administra parto estas ege peza ŝarĝo el financa vidpunkto.

Dum la lasta estrarkunsido ni trovis solvon al tio en tiu senco, ke la membra administrado estos prizorgata de JB kaj la libroservo de ED

5.2. Pozitive estas ke la donacoj grave kreskis, ke la abonantaro al ESPERANTO PANORAMA ankaŭ daŭre kreskas, precipe en Nederlando kaj ke la ŝtataj subvencioj ĉiun jaron kreskas je 5%.

5.3. Nia eldonfondaĵo enhavas + 38.000 BF. Ĝi estas provizata de 4-o da daŭraj pagantoj (po 100 F monate) kaj de liberaj donacoj.

5.4. Ankaŭ ekzistas Informfondaĵo el la profito de la UK en 1982, kiu laŭstate povas esti uzata nur por informado.

5.5. Envere FEL ne estas bankrota, sed ĝi bankrotos ĉirkaŭ duon-1985 se antaŭ tiam ni ne trovo_s rimedon por eviti tion.

5.6. La komisiono pri financa resanigo trovis ke elspezoj ne plu povas esti malpliigata, krom se la salajrataj homoj povos esti mal(pli)ŝarĝitaj eble pere de volontuloj.

5.7. Subtenkartoj estas vendataj ĉefe en Aalst, Limburgo kaj Mortsel.

6. Membrostato

Nova malkresko de 659 al + 500, sed kresko de abonoj al E° Panorama.

PP supozas ke multaj homoj trovas la kotizon tro alta kaj tial ŝanĝis sian

membrecon en abonantecon. Tio kompreneble perdigas seriozan parton de niaj enpesejoj necesaj al bona funkciado. Li sin demandas ĉu reakto de membroj povus esti realigita pere de avantaĝoj al la membroj, ekz. en formo de rabatoj je aĉeto de libroj k.s.

La kvanto de izolulaj membroj malpliigis je + 60 %.

7. Leterpapero.

7. R. Rotsaert proponis disponigi al la grupoj ĝeneralan leterpaperon samaspektan kun en la kapo kaj FEL kaj la grupa adreso ktp.

E.S. favorus ankoraŭ pli, nome kaj UEA, kaj FEL, kaj la grupo, ekz.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO + adreso

FEL (landa asocio de UEA)

Grupo (loka sekcio de FEL)

cele al ankoraŭ plia internacieco.

Tamen, por alveni al tio oni devus devigi al la apliko, sed en libera organizo devigo ne eblas.

8. Radiostacioj.

JB insistas al kiom eble plej multa informado pere de lokaj radiostacioj.

ES ricevis de Ministro Poma la liston de la en Flandrio registritaj lokaj radioj. Estas 455 da ili ! JB kopiigis la listojn laŭprovinco kaj havigos ilin al la grupoj.

Por la informado JB proponas uzi malfermitajn komunikilojn, poŝtkartoj do, ĉar li jam spertis ke fermitaj aŭ presajleteraj komunikoj ne ĉiam atingas sian celon.

9. Diversaĵoj.

Ivo Durwael anoncas ke Institucio Modler akceptis la prezoferton faritan de profesia entrepreno por aranĝi la malantaŭan fasadon de la E°-domo.

Se tiu laboro povos esti farita de volontuloj, la gajno povos esti metita je la dispono de FEL.

Tiel LA VERDA STELO plian fojon rekte helpas en la financa programo de FEL.

Fino je 12.30 h.

PROTOKOLO

pri la ĝenerala jarkunsido de sabato 24-a de marto 1984 en Antverpeno

La listo de la ĉeestantoj estas tro longa por publikigo, sed povas esti enrigardata ĉe la sekretario.

Partoprenas kelkaj eksterlandaj gastoj, nome :

- Bernadette MIHA'LY (pro-MIHAI), sekretario de Turisma Komisiono de Hungara Esperanto-Asocio.
- Stefan McGill, Direktoro de UEA
- Alex Humet, kunlaboranto de UEA.

Komenco : 14.15

La prezidanto (ES) bonvenigas ĉiun kaj speciale la eksterlandajn gastojn kaj lasas la parolvicon al la festparoladanto Leo De Bruyne el Bruselo. La temo : Monda Turismo, jamaĵ atingoj.

Le Debruyne, laŭ tre interesa maniero, prezentas bildon de la situacio de la Esperanto-Turisma fako.

Esperanto-turismo floras en Orient-Eŭropaj landoj, verŝajne pro pli da neceso de la administra valoro de la E^o-Movado. Orient-Eŭropanoj deziras ricevi invitojn por veni okcidenten.

Pollando nuntempe estas la "Mekka" de la E^o-turismo. Ĝin gvidas universitat-diplomita historiisto.

Ekzemple de aprilo ĝis oktobro, ĉiun semajnon veturas aŭtobuso al Varna kaj returne. Ofte temas pri vojaĝoj de "krokodilantoj", sed jen fakte bona okazo por propagandi E-on inter ne-esperantistoj, altiri monon el ne-esperantistaj poŝoj kaj ebligi al Esperantistoj favorajn vojaĝkondiĉojn.

Tie Esperanto servas kiel ponto-lingvo. Bone estus atingi sistemon kiel la Polan, do, akiri agentejon Esperantistan. Tia agentejo povas oferti homajn rilatojn kiujn neniu normala agentejo povas oferti.

Dum la regule okazantaj vojaĝoj, la kunvojaĝantoj (ne-esperantistaj) ricevas plurajn informojn pri Esperanto. El tio rezultas $\pm 20\%$ da ontaj kursistoj.

La plej granda kliento estas la Brita (ne-esperantista) Pacmovado, kiu tre regule organizas vojaĝon kadre de la Orient-Okcidenta Turismo.

Pasintjare okazis 13 vojaĝoj.

Brita Pacmovado donacis duonan milionon da frankoj por aĉeti du aŭtobusojn en Belgio por sendi al Pollando.

Ĉi jare Monda Turismo estos 10-jara. Dum la pasintaj dek jaroj regule kunmetiĝis E^o-Turisma Kalendaro pri 500-o da internaciaj vojaĝeblecoj. La Esperanto-publiko ĝenerale estas vojaĝema publiko, sed restas truo : vojaĝ-agentejo kiu havas la fidon de la esperantistoj. Tro da ili ankoraŭ opinias

ke ĉe normala agentejo ili ricevas pli favorajn kondiĉojn, dum la kontraŭo ofte veras.

En Beneluxo Monda Turismo estas tiel bonŝanca havi vic-prezidanton kiu mem havas vojaĝagentejon komplete instalitan. Beneluxa Monda Turismo eldonos pli modernan vojaĝkalendaron.

Jen en kelkaj vortoj la prelego de Leo De Bruyne al kiu ĉiuj ceteraĵ informpetoj povas esti direktitaj p/a Monda Turismo, Montoyerstr. 37 b.24 B-1040 BRUSELO.

T A G O R D O

1. La protokolo pri la pasintjara ĝenerala jarkunsido estas aprobita.

2. Raportado :

2.1. Financoj.

Paul Peeraerts tre detale eksplikas la financon situacion, la bilancon kaj buĝeton por 1984.

Kelkaj demandoj stariĝas :

- kiel eblas ke la afranko estas tiom malpli alta ol pasintjare ? PP. Tio estis ebla dank'al detala divido de la diversaj poŝtaj senditaĵoj.

- kion signifas : "subvencio al la grupoj" ?

PP. La parto el la kotizoj distinita al la grupoj.

- ĉu la speciala laborgrupo pri financa resanigo alportis profiton al FEL ?

PP. Jes, sed ne tiom ke la defcito malaperis.

Evidentiĝis ankaŭ ke bremsado de la elspezoj ne eblis, krom se la administrado povus esti transparenita de volontuloj.

- ĉu la balo de 05 11 1983 estis defcита ?

PP. Ne, sed la ekzakta konto ankoraŭ ne estas konata.

Tre granda rabisto estis SABAM (aŭtoraj rajtoj), kiu forrabis pli ol la duono de la enirkarta enspezo.

La buĝeto estas unuanime aprobita.

2.2. Kadrokursoj. (André Staes).

AS klarigas la celon kaj neceson de la kadrokursoj : "formi"

La distanco inter esperantisto kaj agado devas esti kiel eble plej malgranda.

Estas du specoj da kadrokursoj : organizaj/informaj (ekz. parol- kaj kunventeknikoj) kaj pedagogiaj (ekz. historio)

La broŝuro entenanta la tekstojn valoras partoprenon en la kurso,

Ĉar tute simple la praktiko estas la plej grava parto el la tuto. El kurso kreskas pli larĝskala agado.

Ĝis nun la kursoj okazis sabate. Ilin partoprenis 10-o da personoj. Estonte ili devas iri pli profunden. Tamen, kiel organizi tion? Ĵam tion da tempo forfluas por aliaj aferoj.

AS proponas organizi la kursojn okaze de provincaj kunvenoj aŭ en apartaj semajnfinoj.

Por fini li antaŭdankas pro specifaj proponoj kaj sugestoj.

Intertempe la broŝuro "KADROKURSOJ" estas ĉiam havebla.

2.3. Gazetara Servo (Herman Deceuninck)

Aperis 70 leteroj kaj artikoloj en la flandra gazetararo, 2 kun mencio de Esperanto sur la frontpaĝo, 3 radio-intervjuoj kaj 1 TV-intervjuo.

Grava konstato estas, ke ne plu aperas negativaj informoj. Ĉu tiu nova fenomeno estus la rezulto de nia aktiva gazetara informpolitiko? Se la Esperanto-movado neglektas la "informadon", tiam ne plu plendu ĉe la redakcioj!

Ni plimalpli ĉiumonate sendas nome de FEL gazetaran komunikon al la ĉefaj tagjurnaloj kaj al kelkaj revuoj. Kvankam tio necesas, la sperto montras ke tio ne vere utilas se la agado mankas ĉe la bazo, t.e., la leganto. Redakcio fakte devas havi seriozan kialon por paroli pri Esperanto en ĝia ĵurnalo. La intereso kiun la temo Esperanto provokas ĉe la legantaro (pere de leteroj de legantoj) estas serioza tia kialo. Laŭ sperto de la franc-lingva gazetara servo, S-ro G. Pirlot konstatas ke el la 167 aperintaj artikoloj en 1983 nur 2 aŭ 3 fontas el komunikoj de APE. (Asocio por Esperanto Post ripeta alvoko en ESPERANTO PANORAMA kaj INFORMILO ni venis al la negativa konstato ke ni preskam izole kaj nesisteme agas: manpleno de kunlaborantoj estas preskaŭ senpova, ĉar se la ĵurnalistoj ĉiam rimarkas samajn nomojn, tio kredigos ilin verŝajne ke la esperantistoj nur formas neglektendan elcenton de la legantaro. Se ni volas esti pli kredindaj, absolute devas doni la impreson ke ni estas pli multnombraj. El sia sperto S-ro Pirlot povas pruvi ke tio eblas, ĉar li sukcesis arigi tutan grupon kiu okupiĝas pri la gazetararo. Ni tial volus lanĉi alvokon al ĉiuj bonvolemaj personoj el via grupo kunlabori kun ni. Ne gravas ĉu tiuj volontuloj jes aŭ ne konas Esperanton, ĉar la nederlanda estas la laborlingvo sur tiu tereno. Do vi ankaŭ elektu inter viaj lernantoj, samklubanoj, parencoj, konatuloj por serĉi:

- personojn kiuj i.a.-pretas agi laŭ specifa agmaniero kaj regularo
- volas diskonigi Esperanton kaj ĝiajn eblecojn
- partoprenantojn en telefona ĉeno por diskonigi rapide gazetrajn informojn
- legantojn kaj kontrolantojn de revuoj kaj tagjurnaloj
- skribantojn kiuj kapablas kaj pretas i.a. verki leterojn de legantoj

- tradukemulojn por traduki interesajn informojn el la E^o-revuaro. Kiel respondo kaj preskaŭ senpaga reklamo por niaj starpunktoj ni, pledantoj por Esperanto, povas sendi legantleterojn al la redakcioj kaj tiel rimarkeble influu la opinion de la publiko. Por tiu celo almenaŭ ĉiu grupo regule sendu unu leteron, eble redaktite de loka aktivulo kaj evt. subskribita de ĉiam alia, por ke oni vidu ke Esperanto ne estas nur la propono de kelkaj malmultaj.

La organizado estas jena:

Kiu trovas en sia revuo aŭ gazeto artikolon kiu estas respondenda, sendas ĝin kun klara indiko de la nomo de la gazeto, la eldontago kaj adreso de la redakcio al la kunordigantoj de la servo. Tiuj ĉi bezonas densan reton de kunlaborantoj, kiuj ankaŭ kapablas (eĉ fake) verki leterojn de legantoj, ĉar ne eblas ke la kunordigantoj verkas ĉiujn leterojn. Ankaŭ la kunlaborantoj sendu legantleterojn kaj kopion de sia letero al la kunordigantoj. Ili (laŭeble) ankaŭ mem kontrolu la rezulton en la alskribita gazeto kaj sendu la artikolon aŭ aperintan leteron al la kunordigantoj.

Ni petas ĉiujn kunlaborantojn anonciĝi ĉe ni. Rapide proksimiĝas la jubilea jaro 1987 kaj nia celo estu ke tiam ekzistu publiko kiu estas bone informita pri la Internacia Lingvo Esperanto.

Por faciligi la laboron, nepre indiku pri kiuj kampoj vi kompetentas, se temas pri reago al artikolo kiu postulas specialajn sciojn. Kunlaborantoj ricevos detalajn direktivojn. Ni esperas ke unu aŭ alia el vi, leginte ĉion tion, sentos sin instigata anonci sin ĉe ni kiel kunlaboranto. Por tio skribu al Herman kaj Annie Deceuninck-Bollaert, Lusthuizenlaan 1, bus 4 1500 HALLE (tel. 02/360 17 22)

Kontaktoj al ĵurnalistoj serĉataj.

Ankoraŭ mankas al ni personaj rilatoj al ĵurnalistoj, precipe de radio kaj televido (ĉu ekz. S-ro Walter Capiiau lernis Esperanton? Laŭ mia memoro estis antaŭ multaj jaroj informo pri tio en Esperanto Panorama) al kiuj indus daŭre sendi ESPERANTO PANORAMA kaj aliajn komunikojn. Kiu havis, havas kaj havos tiajn kontaktojn, komuniku tion al ni.

2.4. FLEJA (K. Tytgat)

Jam de fion da jaroj mi aperas ĉi tie kun la jarraporto de FLEJA, kiu listigas la aktivecojn de la pasinta jaro. Ĉi jare tamen estas du ŝanĝoj en mia prezentado: unue, mi ne plu parolas ĉi tie estante la FLEJA-prezidanto, sed kiel reprezentanto de la junularo en FEL. Nun Wim Tytgat estas FLEJA-prezidanto. Due, mi ŝatas nur tre mallonge mencii niajn pasintajn aktivecojn, ĉar vi ĉiukaze legos pri ili en nia jarraporto aperonta en INFORMILO. Mi kontraŭe ŝatas kun emfazo mencii la problemojn kiuj klare montriĝis en la jarkunsido de FLEJA, okazinta pasintan dimanĉon.

Unue, do, mallonge la 'senproblema' flanko :

1. en 1983 FLEJA prizorgis la vesperprogramon en Kalmthout okaze de la Semajho de Internacia Amikeco.
2. FLEJA helpis FEL dum la kongreso en Leuven en septembro 1983.
3. FLEJA organizis la 6-an renkontiĝon en Wavre de 29 ĝis 31 10 1983 kun ĉeesto de 70-o da personoj kaj kun la temo "Memprotektado". Sekve de interŝanĝoj kun Pola Studenta Esperantista Komitato (PSEK) 4 Poloj restis poste en Belgio por vizito. Jam 2 FLEJA-anoj reiris intertempe al Pollando, nome al ski-ferioj en Zakopane.
4. Ilse Jacques, FLEJA-estrarano, elektiĝis en la Junularkomitato de la organizo JEUGD EN EUROPA de kiu ni ricevis subvenciojn por Wavre.

Andre Ruyschaert fariĝis la nova redaktoro de nia revuo JEN (Jongeren Esperantist Nieuws) kaj kun zorgo plenumas tiun taskon.

La varbada aspekto estis forte neglektita en 1983, parte ĉar mankas al ni la kreo de taŭga varbpolitiko kaj parte ĉar ni ne disponis pri la homfortoj por aktivi en tiu kampo. Ĉar ni scias, ke kaj FEL kaj LA VERDA STELO en Antverpeno okupiĝas pri varbado, ni ŝatus proponi tujan kunlaboron estonte. Mi mem estas la nuna estrarano pri varbado kaj pretas prikonsideri tiun laboron.

Unue FLEJA intencas reeldoni la informbroŝuron por la junuloj. Ĉu FEL havas broŝuron kun gramatika superrigardo kiun ni rajtus aldoni al nia faldfolio? Tiam ni ne devas ŝanĝi la enhavon de nia broŝuro.

Plej granda kaj urĝa problemo estas la LIBROSERVO.

La 9-an de julio FEL kaj FLEJA ellaboris interkonsenton por komuna agado. Tamen kelkaj aspektoj de tiu kunlaboro devos esti reviziitaj, ĉar ili ŝajne ne funkcias. Ite Tytgat faris ĉiun laboron por starigi la servon. Provizore FEL kunlaboras en tiu serio. Tamen devas esti klara fakto, ke kio povas esti la decido de FEL rilate al SONORILO, FLEJA intencas provizore teni sian libroservon por kiu ĝi mem laboris kaj kiu estas la nura maniero por finance survivi. Ni nun do ne povas akcepti proponojn kiuj celus la nepluekziston de nia libroservo. Du fojojn jam aperis en ESPERANTO PANORAMA anoncoj por vendi tiujn brojojn kun malsamaj prezoj de tiuj de FLEJA. Ĉu ne estus pli favore al la bonaj rilatoj inter FEL kaj FLEJA, ke FEL antaŭe interkonsentus kun Ite pri la enhavo de tiuj anoncoj? Se ambaŭ organizoj aplikas malsamajn prezojn, ni ne plu povas paroli pri komuna libroservo. (En la jarlibro 1984 aperos libroservo FEL-FLEJA)

Estas Ite kiu grandparte aĉetas la librojn kaj kiu administras ilin. La promesi tan helpon en GCA de konstanta persono ni ankoraŭ ne spertis! Tio verŝajne ankoraŭ estas la kaŭzo ke FLEJA ne ricevas bonan superrigardon pri tio, kion vendis FEL. Pro ĉio tio ni proponas ke baldaŭ okazu kunsido kun la respondeculoj de FEL kaj FLEJA.

Alia problemo en la rilatoj GCA-FLEJA estas la financa aspekto. Ĝis antaŭ unu jaro J.P. VandenDaele estis laborigita senlaborulo en GCA. Laŭ interkonsento li rajtis dum siaj liberaj laborhoroj ankaŭ iom labori por FLEJA, ĉar tamen la ŝtato pagis lin. Antaŭ unu jaro li vere dungigis. Li ankoraŭ pretas de tempo al tempo labori por FLEJA, sed ĉiuj liaj laborhoroj devas esti fakturitaj. Ĉu ne estus estinte pli ĝentile al FLEJA, ke oni informus FLEJA pri tiu ŝanĝo? Ĉu vere oni opinias, ke FLEJA povus pagi salajrojn de tiuj kelkaj libroj kiujn ĝi kun peno vendas aŭ de tiu subvencio, por kiu ĝi devas penadi por obteni ĝin? La laboro de Jean-Pierre povos esti facile farita de alia estrarano, ne pagita kaj ĝi estos farita tiel ekde nun. Sed konsentu kun ni, ke tio estas bedaŭrindaj konkludoj. Ne povas esti la intenco bankrotigi FLEJA-n, sed pro simpla manko de informado ĝi ŝajnas tia. Sciu, ke multaj membroj de FLEJA estas je la aĝlimo de 25 jaroj. Baldaŭ ili transiros al sia FEL-periodo, sed kun la nuntempa situacio ili ricevas malfavoran impreson pri la tuto.

Pere de domicilio FLEJA pagas ĉion pagendan al FEL. FLE kontraŭe ne pagas tiujn siajn fakturojn al ni. Ankaŭ pro la risko de grandaj salajrokostoj ni nun ĉesas tiun domicilon. Ni esperas ke GCA tiam ne fakturos per nia UEA-konto.

Mi pensis ke ni havas Centron por labori favore al ni. FLEJA nun devas serĉi ĉiujn rimedojn por ke la Centro ne povu damaĝi al ni. Tiu ĉi konstato donas amaran guston en mia buŝo.

Jen fino de la problemaro. Mi esperas, ke la bilanco ne estis tro negativa. Resume mi povas konkludi, ke la kerno de la problemaro estas mankoj de informo, ne-avertoj. Se tio estos plibonigita, ni povos esperi, ke 1984 fariĝos pli bona jaro.

Ekde aprilo la kontaktjunulo por FLEJA en Valonio, Eric COLLIGNON, havas novan adreson :
rue d'Arlon 4, 6620 NEUFCHÂTEAU.

Ekde majo la nova adreso de la JEN-redaktoro estos :
Andre Ruyscahert, Ganzestraat 89
8000 BRUGGE.

2.5. INTERGRUPA AGADO

Nia plej grava tasko estis renovigi la kontaktojn inter la diversaj grupoj kaj la FEL-estraro. Pro tio pasintjare ni organizis kunvenojn kun la lokaj grupoj en ĉiu flandra provinco.

La 5-an de februaro ni vizitis Aalst en Orient-Flandrio. En aprilo Kortrijk en Okcidento-Flandrio bonvenigis nin. La 4-an de junio ni estis en Leuven (Brabanto) kaj finfine la 3-an de decembro ni kunvenis en Hasselt (Limburgo) La programo ĉiam estis la sama : antaŭtagmeze FEL-estraro kunvenis sola,

posttagmeze okazis kunveno kun la lokaj grupoj. Kompreneble la aliajn monatojn FEL-estraro kunvenis ĉi tie en Antverpeno.

Pliaj organizaĵoj niaj estis : la aperitivkoncerto kun malvarma bankedo, organizita en junio en Aalst kun gajno de BF 10.000,- profite al FEL kaj la balo, kiun ni organizis en Antverpeno verŝajne sen gajno, estis tre agrabla kaj sukcesa. Sed ni diru: "el multaj milonoj fariĝas milionoj" kaj "kiu groŝo ne respektas, riĉaĵon ne kolektas" !

Mi ankoraŭ volas atentigi vin pri la dua flandra kongreso kiu okazos en Aalst la 31-an de aŭgusto, 1-an kaj 2-an de septembro. Aliĝu kaj ĉeestu tiun kongreson kaj ankaŭ aĉetu la glumarkojn.

Dankon

2.6. BEFA (L. De Sutter)

En 1983 BEFA havis ka taskon organizi la 35-an IFEF-kongreson. Ĝi okazis en Oostende de la 4-a ĝis la 10 de junio en la Festa kaj Kultura Palaco de la urbo sub aŭspicioj de FISAIC (Internacia Federacio de Artaj kaj Intelektaj Fervojistaj Societoj).

Dum la inaŭguro i.a; S-ro FLACHET, ĝen. dir. de la belgaj fervojoj, S-ro GOEKIND, urbestro, S-ro SCHMIDT, ĝen. prez. de FISAIC, S-ro Maertens, prez. de UEA, S-ro DEMONTY, prez. de BEF. Neniu reprezentanto de FEL ĉeestis.

Aktive kunlaboris : S-ro P. De Smedt el Aalst. Li prelegis pri kariljonoj kaj donis kariljonkoncerton. Akompanate de S-ino Tiana Moons, li agrabligis du vesperojn. Grupo "Nostalgio" sub la gvidado de Ramona van Dalsem rikoltis multe da aplaŭdoj kaj da laŭdoj. Pastro Beckers kaj Pastorino Koopmans ebligis sukcesplenan ekumenan diservon en la ĉefpreĝejo. Kantis esperantilingve soprano Barbara Kohl el Luksemburgo. Ges-roj D'Hulster organizis gvidatajn vizitojn en la urbo Oostende.

En la programo tri ekskursoj : Bruĝo, gvidata de Bruĝaj esperantistoj; Zeebrugge, faka ekskurso kaj tuttaga ekskurso tra la flandraj historiaj urboj. En Kortrijk okazis oficiala akcepto dank'al la E^o-grupo de Kortrijk.

La kongreso kaj la gazetaro.

Ni ricevis intervjuon en la flandra radio. Multaj gazetoj kaj revuoj ne-esperantistaj raportis favore antaŭ, dum kaj post la kongreso. Ĉiuj periodaĵoj de la landaj IFEF-sekcioj detale raportis kaj komentis. Oni taksis la kongreson de Oostende la plej faka kongreso de IFEF. Ankoraŭ en Esperanto, El Popola Ĉinio, Heroldo de Esperanto, The Australian Esperantist kaj Esperanto Aktuell. Tamen nenio aŭ preskaŭ en la Belga Esperanto-periodaĵoj.

Ni ĝenerala jarkunveno okazis kune kun niaj nederlandaj kolegoj en Oudleusen kaj la aŭtuna komuna kunveno en Heerlen. Du interesaj kaj kulturaj semajnfinoj. BEFA ankam partoprenis la ĝeneralan jarkunvenon de GEFA en Lüneburg kaj la tutsemajnan aranĝon de la ĝenerala jarkunveno de FFEA en Sevrier apud Annecy.

La membrastato iomete stagnas.

En la 35-a IFEF-kongreso, la BEFA-prezidanto estis unuanime reelektita ĉefkomitatano de IFEF.

La BEFA-prezidanto reprezentis en la belgaj fervojoj en la ĝenerala jarkunveno de FISAIC en Helsinki.

2.7. ILEI (E. Symoens, prez. de la Flandra sekcio)

Raportado pri ILEI aparte ne estas eble, ĉar la aktivecoj de unu koincidas kun tiuj de la alia.

Kompreneble estas, ke ILEI laboras ĉefe en pedagogiaj medioj.

2.8. IKUE - Belga Ligo de Katolikaj Esperantistoj (H. Audenaert)

En 1983 okazis landa kunveno en Bruselo. Ĉiuj membroj abontantoj al ESPERO KATOLIKA estas membroj de la landa asocio.

Li antaŭvidas kunvenon je kiu li esperas konvinki al plia membriĝo.

2.9. Sekretariaj jar- kaj morala raportoj. (JB)

Komenci mi volus per laŭdado de nia financkomisiono.

En januaro pasintjare ni, pere de INFORMILO alvokis al pli streĉa kunlaboro proponante klopodi altigi la membronombro kaj strebi al la cifero 1.000. La membronombro en 1982 estis 659. La altigon do devis esti + 50 %-a. Tiu propono originis el la konstato de nia financa komisiono, ke granda parto el niaj financaj rimedoj venas el la membrokotiozoj. Ŝajne la signifo de nia propono ne estis bone komprenita, ĉar la membronombro en 1983 denove falis ĝis + 500. Ni perdis do proksimume 1/4 de niaj membroj. Malgraŭ tio, niaj financistoj sukcesis malpliigi la ekzistantan deficiton per 1/4 kaj tiel pruvis, ke iliaj penoj resanigi la financon ne estis senfruktaj. Imaĝu ke ni jes estus sukcesintaj pliigi aŭ almenaŭ gardi nian membrokvanton.

Aplaŭdenda ŝajnas al mi almenaŭ la laboro de nia financa komisiono.

Pri la agado :

A. Flanke de FEL-estraro kaj ĝiaj komisionoj:

1. La kadrokursoj ankaŭ en la periodo 1982-1983 okazis. En 1983 okazis kvar kursotagoj : Kunven- kaj Debatteknikoj, fare de Paul Peeraerts; Historio fare de Fernand Roose; Komunikado-Informado, du tagoj, fare de Anne Tilmont. La aliaj programeroj : Instruteknikoj (Emil Van Damme), Literaturo (Christian Declerck) kaj Parolteknikoj (Paul Peeraerts) jam okazis en 1982. Nia iniciato trovis sekvon kaj peto pri kunlaboro venis de BEF por okazigi la kursojn ankaŭ en la Trilanda regiono Aachen-Liege-Maastricht. Tamen realiĝis nur parto de nia serio, nome Parol-, Debat- kaj Kunventeknikoj (Paul Peeraerts) kaj Komunikado (Anne Tilmont)

Konstatinte, ke gvidi kadrokursojn en diferencaj lokoj pri samaj temoj fakte kaŭzis grandan tempoperdon kaj do ankaŭ mon-perdon, ni proponis al BEF transpreni la respondecon kaj organizon de la kadrokursoj naciskale. Kvankam BEF principe akceptis, ni havas nenion por raporti tiurilate.

La tekstoj de la kursoj aperis broŝurforme. Ili estas ankoraŭ ĉiam haveblaj. Tamen, por eviti ke la tuto estu tro multekosta, konsiderante inter alie ke ne ĉiu interesiĝas pri la tuta serio da tekstoj, ni decidis en FEL-estraro eldoni ilin en apartaj laŭfakaj kajeroj, kompreneble nur se estas sufiĉe da intereso.

2. Provincaj kunsidoj okazis en kvar Flandraj provincoj. La unua okazis en Aalst por Orient - Flandrio je la 5-a de februaro. Speciala rimarko tiurilata estas, ke el tiu kunveno devenas la ekestiga ideo pri 'komisiono pri ŝparoj', poste nomita 'komisiono pri financa resanigo'.

Dua provinca kunveno okazis en Kortrijk por Okcident-Flandrio je la 9-a de aprilo. Tria en Leuven por Brabanto je la 4-a de junio kaj kvara en Hasselt por Limburgo je la 3-a de decembro.

Ĉu tiuj kunvenoj estis sukcesaj kaj fruktodonaj? Rilate al la ĝenerala agado, jes. Pri tio ni reparolos en la rubriko 'grupa agado'.

3. Eldonoj.

Unu el la plej gravaj eldonitaĵoj estas la 'Manlibro de la Aktivulo'.

Alia 'Jahto veturas for' de Deck Dorval

ESPERANTO PROGRAMITA estis represita. Temas pri la kvara represo.

Aperis ankaŭ 'Flandra kaj Nederlanda Bibliografio' de Thys, same, kiel jam dirite, la tekstoj de la kadrokursoj.

4. Jubilea Jaro.

Fine de 1983 kreiĝis speciale tutlanda komisiono pri la Jubilea Jaro, kiu poste ricevis la nomon 'Klubo 100'. Multo ankoraŭ ne okazis, sed diri ni jam povas ke aliĝi povas ĉiu ajn - Esperantisto aŭ ne - pere de pago de unu foja kotizo de BF 1.000,-. Aliĝo rajtigas partoprenon en ĉiuj decidoj, ĉeesti ĉiujn kunsidojn, voĉdoni, sugesti ktp. Jen la kontonumero : 034-0379435-33 nome de KLUBO 100, Bruselo.

La vera agado okazis ekde 1984, kaj do priraportenda en la venonta jarkunsido.

5. Resanigo de la financoj.

La 12-an de marto okazis speciala studotago de la komisiono pri financa resanigo. Menciinde estas ke tiu komisiono fakte agadas ekster la estraro. Temas do pri grupo da bonvolemuloj, kunvokitaj de niaj amikoj el Aalst, kaj prezidata de Petro De Smedt. La celo de tiu unua kunveno estis trovi novajn enspez-eblecojn. Dua kunveno servus al serĉado de ŝpareblecoj.

El tio rezultis unue Aperitiv-koncerton en Aalst je la 2-a de junio kaj Esperanto-balo en Berchem la 5-an de novembro.

Alia monalporta rimedo estis la presado de persona leterpapero kaj la fabrikado kaj vendado de fest-kandeloj.

6. Libroservo :

Bedaŭrinda okazaĵo estis la malpacigo kun la landa libroservo SONORILO.

Detalojn mi prefere ne donos nun, kvankam mi pretas ekspliki la situacion je speciala peto. Fakte estas ke, ĉar ni ne sukcesis ordigi la situacion, ni ne vidis alian eblecon ol distancigi nin de SONORILO kaj krei nian propran libroservon.

Do, atentu pri tio, ke venonte vi mendu viajn librojn ĉe FEL en nia propra Esperanto-Centro.

7. Kongreso okazis en Leuven de la 9-a ĝis la 11-a de septembro. Kvankam la kongreso fakte apartenas al la grupa agado, mi tamen volas raporti pri ĝi kadre de la ĝenerala programo.

Ĝia temo estis "Internacia Komunikado", ĝia programo ege kompleksa, ĝia tuto sukcesa. Ĝi i.a. ebligis novajn kontaktojn kun politikaj gravuloj kaj pliampleksigon de la ĝenerala informkampanjo pri kiu speciale okupiĝas nia prezidanto, S-ro Symoens.

Pri la tuto ni danku al la organizintoj, niaj amikoj el Leuven, kiuj certe meritas aplaŭdon.

8. Fine, pri ĝeneralaj aferoj mi volus ankaŭ mencii ke jam haveblaj estas - je peto al nia Centro - membrolistoj laŭprofesiaj, io kio ebligas ekz. agadon ene de specifa fako.

Aliflanke, por servi al la grupoj, decidiĝis duobligi la flavajn paĝojn de ESPERANTO PANORAMA, por ebligi komunikadon kaj pli detalan informadon pri la grupaj okazaĵoj.

8. Provinca agado.

Ĉu multe okazis sur provinca nivelo? Certe jes en la provinco Antverpeno.

Tie, iniciate de la VERDA STELO, decidiĝis fari specialan provon kadre de nia membropolitiko. Nome, LA VERDA STELO daŭre sendis sian novaĵbultenon kaj venonte ^{sen las} ESPERANTO PANORAMA-n al ĉiuj en la lastaj jaroj aliĝintoj kaj petinto de informoj. Alivorte, pli ol la kvaroblo de la vera membraro daŭre ricevas la ĝeneralajn informojn. Ĉu la eksperimento sukcesos elmontru la estonto. Sed agnosku, ke la inciato estas valora kaj atestas pri serioza kunlaboro de LA VERDA STELO en la ĝenerala agado. Dankon, do, al la respondeculoj de LVS.

El Okcident-Flandrio ni ricevis raporton de Roland Rotsaert. Li donis informojn al diversaj personoj ekz. el Oostende, Lichtervelde kaj Ieper. Li konstatis ke la tri ekzistantaj grupoj devus pli bone inter-kunlabori, dum en la regiono de Oostende estas pluraj esperantistoj aŭ kandidat-esperantistoj. Li ankaŭ spertis mankon de kelkaj personoj pretaj por fondi novan grupon. Tamen, pro tio ke li mem iĝis prezidanto de loka grupo - la Bruĝa grupo Esperantista - anstataŭ karmemora S-ro Poupeye - Roland serĉas anstataŭanton kiel provincan respondeculon por Okcident-Flandrio, por eviti nekongruajn situaciojn.

Aliaj ĝeneralaj provincaj raportoj ne envenis.

C. Grupa agado.

6-o da grupoj regule raportis pri sia agado pere de la aktivecraportoj :

Aalst, Antverpeno, Bruĝo - Paco kaj Justeco, Gent, Hasselt, Leuven kaj Mortsel. El tiuj raportetoj ni provis fari tabelon, kiu tamen ne havas statistikan valoron, sed donas nur supraĵan superrigardon de la tuto.

Konsidere al la antaŭe anoncita, sed feliĉe ankoraŭ ne materialigita, subvencidekreto, laŭ kiu ni devus organizi minimume 100 klerigajn aktivecojn al kiuj partoprenu minimume 12 personoj, ni povus unua-vide diri ke nia ĝenerala agado larĝe superas la minimumon. Tamen ne forgesu ke temas pri klerigaj (edukativaj) programoj. Do, se ni rerigardas al nia tabelo, ni konstatas ke fakte estas konsiderindaj nur ekspozicioj, filmoj, dia-serioj, prelegoj, internaciaj vesperoj (eble !) kaj nur parto el la diversaj programoj. Do, en la realo fakte nur pli malpli cent. Apenaŭ sufiĉe, ĉar ja la programoj devas esti antaŭe anoncitaj kaj aprobitaj de la ministerio. Do, tro frue por venkokrii, sed ne tro frue por insiŝte alvoki al ankoraŭ pli energia partopreno kaj kunlaboro en la ĝenerala programo.

Estas ^{Kroma} grupoj en kiuj sufiĉe multe okazis. Unu el tiuj estas la Bruĝa Esperantista Grupo, Reĝa Societo. Tie, kiel ni jam diris, venis nova prezidanto, kiu devis reorganizi la grupon kaj sukcesis restarigi regulajn kunvenojn kaj aperigi kluban buletenon. Plie, tiu grupo intencas organizi la FLEJA-renkontigon fine de 1984 kaj Markolan Kongreson en aprilo 1985.

Pri loka agado, ni ne povas plendi, almenaŭ ne tie kie ĝi vere okazas. Al la aliaj grupoj ni povas - kaj nun ankaŭ faras ! - alvoki al pli-vigligo. Eble ni povas peti al la provincaj respondeculoj sin okupi speciale pri tiuj grupoj kie efektiva agado mankas.

Kiom ajn kontentiga povus esti la rezultato de la ĝenerala agado, ni certe ne povas, ne rajtas malpliigi ĝin kaj en la venonta jaro ni serioze pensu ankaŭ pri nia membroforto. Ni ne plu povas permesi al ni peti ankoraŭ pli da membroj.

La lastajn jarojn tiu problemo vere iĝis seniluziiga por ne diri malkuraĝiga. Ĉiun jaron denove ni devas konstati perdon de membroj kaj eĉ multaj. Kiu kulpas ? Ĉu ni, estraranoj de FEL ? Jes, ni konsciigas ke ni enkondukis diversajn ŝanĝojn, tamen nur eksperimente kaj en konsento kun la ĝenerala kunsido. Eble kvanto da ne tro fervoraj membroj profitis de tio, por forlasi niajn rangojn. Eble ankaŭ grupaj respondeculoj sin sentis forŝovitaj sed ne kuraĝis eldiri sian malkontentecon kaj ĉesis kontakti la membrojn por instigi ilin al realiĝo. Eble eĉ certaj aktivuloj ne pardonis al ni la ŝanĝojn kaj turnis al ni sian dorson. Eble estas aliaj kialoj, kiu diros ? Eble la estraranoj ne kompetentas. En tiu kazo ni atendas novajn kandidatojn kaj la rezultaton de la venonta balotado.

Certe necese estas, ke tiu kiu havas ion por diri, ĝin diru rekte kaj sentime kaj eventuale havu la kuraĝon preni lokon en la estraro. Ĉiukaze ŝajnas al mi hontinde sendi anoniman leteron, kiel okazis en la pasinta jaro kaj eĉ kuraĝi peti ĝin publikigi en INFORMILO. Jen io, kion mi profunde malaprezas.

Nu, ni esperu ke la venonta kongreso en Aalst metos nin en la bonan direkton kaj ke la tiam okazonta kolokvo alportos al ni la necesajn elementojn kaj kuraĝon.

Ni ja povis jam konstati ke la agado en si mem pliboniĝis. Kiel do eblas ke ni samtempe perdas membrojn ? Ĉu eble ni tro pensis pri la programoj mem kaj ne sufiĉe pri niaj membroj ? Ĉu ni atentis nur aŭ tro la novajn aliĝintojn kaj forgesis aŭ maltro atentis la jamajn membrojn ? Certe io malbonfikas. Sed kio ?

Ni tamen ne perdu kuraĝon, sed restu realismaj, ne perdante la veran kialon de nia movado, la internan ideon de Esperanto, nome veran humanismon pere de forigo de komunikaj bariloj.

Ni ne estu pesimismaj, nek tro optimismaj, sed jes kuraĝaj kaj obstinaj.

Eble por fini, mallonga anekdoto :

Tri ranetoj falis en sitelon da lakto. Unu estis pesimisma. Ĝi diris : "Ho, ve, mi neniam elsavos min el tio !", kaj efektive ĝi dronis. Alia estis optimisma kaj diris : " Mi certe elsavos min !". Kuraĝe ĝi atendis sed nenion faris kaj ankaŭ dronis. La tria estis realisma. Ĝi baraktis dirante : "Oni neniam antaŭscias !". Ĝi obstine baraktadis ĝis finfine ĝi sentis ion solidan sub la piedoj. Ĝi estis baraktinta la lakton en buteron kaj tiel povis salti el la sitelo.

Alivorte, neniam perdu kuraĝon sed obstine daŭrigu !

Dankon.

	Aalst	Antwerpen	Brugge	Pac. Just.	Gent	Hasselt	Leuven	Mortsel	Totaloj
Estrankunsidoj	8	5	2			2	4		21
Ĝeneralaj kunsidoj	2	1	1		1	1	2		8
Ekspozicioj	1	1				1	1		4
Partoprenoj en foiroj	1					1	1		3
Aliaj informarangoj						1	2		3
Festoj	1	4	1				3	1	10
Amuzaj vesperoj	1						7		8
Filmoj		1	2				1		4
Dia-serioj	3	6	2			1	6	3	21
Prelegoj	4	12	4		1	1	8		30
Internaciaj versperoj		19							19
Diversaj arangoj kvizoj, muziko ktp	2	13	2			4	18	31	70
Totaloj de la aktivecoj	23	62	14		2	12	53	35	201
Meza partoprenombro	14 90 / 3	?	13 24 / 6		16 17/15	?	17 84 / 2	6 14/4	

2.10. Prezidanta raporto (ES)

Karaj Ĝeamikoj,

Jen la fino de mia kvinjara prezidanteco de FEL. Eĉ se mi povus, mi ne plu restus prezidanto, ĉar mi opinias tre sincere, ke post kelkaj jaroj estas necese ke novaj ideoj renovigu kaj vigligu nian asocion.

Mi tute ne povus diri kion mi realigis por FEL, ĉar ĉio kion mi faris, estis farata grupe, en kunlaboro. Kaj mi havis la ŝancon disponi pri elstaraj kunlaborantoj. Estas normale, ke miaj dankemaj pensoj iras unue al ili.

Unuavice al nia fidela, laborema, entreprenema kaj efika sekretario Jan Bovendeerd, ĉiam preta, ĉiam disponebla kaj al tiuj kiuj okupiĝas aŭ okupiĝis pri la sendanka finclaboro de nia asocio : Jules Verstraeten, Roger De Schep- per, Paul Peeraerts kaj Erik D'Hondt. Tiuj estas aŭ estis la ĉiutagaj kunlabor- antoj, sed multaj aliaj, kiujn mi ne povas citi ĉiujn, kunlaboris entuziasme kaj efike, en aŭ ekster la estraro, por starigi la novan asocion, organizi ĝin, evoluigi ĝin laŭ sanaj principoj. Ili ĉiuj akceptu mian profundan dankecon pro ilia sindonema laboro.

Unu personon mi hodiaŭ speciale volas danki, ne pro lia rekta koncerneco kun FEL, sed pro la fakto ke estas li kiu enkondukis min, post mia reveno el Afriko en 1975, en plurajn Esperanto-mediojn. Dank'al Wim De Smet - ĉar temas pri li - mi sufiĉe rapide reintegrigis en la nacia kaj internacia Esperanto- movado, kionmi estis forlasanta en 1947.

Mi eklernis Esperanton en 1930, dekkvinjaraĝa en Nieuwpoort, korespondis kaj skribis artikolojn en studentaj revuetoj. Jam antaŭ la milito, mi renkontis Emiel Cortvriendt, sed estas precipe post la milito ke ni kunlaboris por restar- igi la Flandran Esperanto ligon. Mi ofte renkontis lin en lia hejmo en Bruselo. Estas E. Cortvriendt precipe, kiu preparis la Esperanto-kurson kiun mi, dank'al kelkaj influaj amikoj el la 'Vlaamse Club', kies sekretario mi estis, faris ĉe nia nacia radio NIR. Ni neniam etos sufiĉe dankaj al tiu modesta homo, kiu dedi- ĉis sin tage kaj nokte al la restarigo de la Esperanto-movado en Flandrio.

Post 1947 en Afriko, mi komence organizis kurson sed kiam mi en 1949 est- igis estro de la 'Koninklijk Ateneum' en Leopoldstad, mi ne plu havis la tempon okupiĝi aktive pri Esperanto. Mi tamen sufiĉe ofte prelegis en kluboj kaj ĝis 1959, mi restis delegito de UEA !

Ekzistas do granda interrompo en mia esperantista kariero. Dank'al Wim De Smet, mi sufiĉe rapide reprenis la fadenon kiun mi faligis en 1947 kaj tiel mi nun povas diri kiom feliĉa mi estas laborante por Esperanto.

Mi ne rigardos malantaŭen. La sekretario ĉiujare resumas niajn aktivecojn kaj nur apartenas al vi juĝi ĉu nia teamo bone laboris aŭ ne !

Unu elstaran eventon mi tamen ne povas preterpasi : la 67-an Universalan Kongreson en Antverpeno, kiu pruvis la kapablon de nia enlanda movado modele organizi grandan renkontiĝon internacian.

Ĉar mi ne deziras misuzi vian paciencon, mi ne parolos tre longe. Mi tamen deziras komuniki al vi almenaŭ kelkajn ideojn, kiuj eble povas orientigi nian venontan agadon.

1° Mi opinias, ke nia movado nuntempe stagnas kaj enlande kaj internacie. La akiritaj rezultoj certe ne estas proporciaj al la laborego farita de multaj aktivuloj tra la mondo.

2° Se tio estas vera, ni nepre kaj urĝe devas pristudi la situacion, serĉi la kaŭzojn - internajn kaj eksterajn - kaj trovi rimedojn. Ĉi tiuj estas enhavaj kaj strategiaj. Ni dediĉos studtagon al tiu problemo dum nia kongreso en Aalst ĉi jare.

Mi persone multe okupiĝas pri strategiaj problemoj kaj baldaŭ partopos en simpozio en Varsovio pri tiu temo, organizota de la Esplorleriga Centro de Pola Esperanto-Asocio. Mi havos la okazon en Aalst informi vin pri la konkludoj de niaj diskutoj.

3° Ni nepre devas konigi nin en influriĉaj, decidpovaj medioj je ĉiuj niveloj de la socio. Se ni nur daŭrigas la kutimajn informagadojn - mi diras NUR, ĉar ni nepre devas daŭrigi ilin ! -, ni ne sufiĉe rapide progresas. UEA nun disponas pri detala agadprogramo en pedagogiaj medioj, sed multaj esperantistaj aktivuloj ankoraŭ ne konscias pri la neceso kunlabori translime surbaze de la sama, fundamenta programo. Ni do unue devas informi kaj konvinki niajn proprajn homojn, antaŭ ol konvinki aliajn !

Tiurilate mi povas anonci ke mi komencis la informkampanjon en Flandrio - kaj Valonio sekvas - kaj mi promesas ke mi ne haltos antaŭ ol atingi kelkajn pozitivajn rezultojn. La sekreto de ĉiu sukceso ja estas en la persito.

4° En kelkaj universitataj medioj io ŝanĝiĝas kaj ni devas profiti tiun ŝanĝigon. En Gento aperos ĉi jare libro 'Etudes sur la Langue Internationale', eldonota de alnivela scienca serio, kun nacilingvaj artikoloj pri Esperanto kaj resumoj en Esperanto. Estos la unua samspeca libro sur la merkato. Rezulto de sesjara penado !

Ankaŭ en Gento mi interrilatas kun du profesoroj, kiuj deziras fari ion por Esperanto. Prof. de Grève principe konsentas organizi en 1985 internacian informsimpozion je universitata kaj scienca nivelo pri Esperanto. Prof. Willems konsentas klopodi interesigi studentojn pri verkado de tezoj aŭ disertacioj rilate al Esperanto.

En Mons, post longa preparo, du asistantoj de prof. Penard informiĝos surloke en Paderborn pri la esploralaboro de prof. Frak kaj poste organizos eksperimentojn en Mons mem.

En Bruselo, la VUB organizos la 7-an Mondan Kongreson pri aplika lingvistiko. Dank'al prof. Nivette, Esperanto estis bone reprezentata per 4 prelegoj kaj trihordaŭra simpozio ; ankaŭ estos ekspozicio de Esperantolibroj pri lingvoproblemo Ankaŭ en Bruselo, sinjoro Pirlot kaj mi mem prelegis fraŭclingve kadre de ULB en

la Asocio de psikologoj kaj pedagogoj. Ni tie nun havas apogon. En ĉiujn tiujn mediojn por ni tre gravajn, ni malrapide sed certe enpenetras. Pro tio, ni bezonas tutan serion de nacilingvaj informbroŝuroj, ne tro longaj, sed solide dukomentitaj.

5° En la sino de FEL ni bezonas studgrupon kiu daŭre analozas la rapide evoluantan situacion, kiu serĉas adekvatajn solvojn, kiu taksas la rezultojn, sen iu ajn cedemo al memkontenteco aŭ facileco, kiu preparas dokumentojn kaj proponas agadplanojn kaj -strategiojn.

Tia studgrupo ekz. ankaŭ mankas al UEA. Ĉiuj oficialuloj tutsimple ne havas tempon nensi, studi, trankvile konsideri kaj analizi.

FEL memkompreneble unuavice okupiĝas pri niaj aferoj, sed ĝi ne timu ankaŭ aktive interesiĝi pri la monda movado. Ambaŭ ofte estas interplektitaj. Ni ne timu iniciati agadojn kiuj transiras niajn landlimojn, - iedoj ja ne konas iujn ajn limojn ! Ni povas doni impulson kiu nepre mankas nunmomente al nia movado, skizi vizion pri la estonta evoluo de Esperanto en la mondo. Nacia Esperanto-asocio laŭ mi nepre havu tiujn du aspektojn : nacian kaj internacian. Ni uzu naciajn rimedojn por atingi internacian fincelon. Ni, do, neniam povas perdi el vido la fincelon de nia movado : la ĝeneraligatan uzon de Esperanto por internaciaj rilatoj.

Ankaŭ esperantistoj tro ofte forgesas ke Esperanto estas esence internacia afero, ne nacia. La naciaj asocioj nur ekzistas pro praktikaj, organizaj motivoj en funkcio de internacia agado. Ĉi lasta bedaŭrinde plej ofte mankas kaj ne estas UEA kiu donas la necesan impulson, kiu kunordigas izolajn agadojn.

UEA, antaŭ ĉio, administras. Ĝi ne estas koro, kies batojn ni sentas ĝis en ĉiuj sekcioj, ĝi ne vere gvidas la operaciojn. Kaj tamen, estraranoj kaj funkciuloj laboregas, sed mankas ĉenero, mankas instanco ne-administracia por efektiviĝi la principajn decidojn.

Pri ĉiuj tiuj problemoj, kiuj ne rekte rilatas al la landa asocio, ni devas konsciiĝi kaj kunlabore serĉi solvojn, fari proponojn kaj ne atendi iun ajn de supre por agi kaj iniciati.

Ĉi tiuj ideoj estas je la bazo de miaj nuntempaj repensaĵoj. Mi formulis ilin iom dise, sed mi preparis pli koheran dokumenton, kiun mi submetos al UEA.

Kvankam ne plu estonte prezidanto, mi tamen deziras daŭrigi kunlaboron kun FEL, en iu ajn funkcio, kiun vi konsentos prezenti al mi.

Mi deziras al vi ĉiuj, karaj geamikoj, multan kuraĝon kaj persiston por daŭrigi kaj plibonigi la komencitan laboron.

Sekvas adiaŭa alnrolado fare de la sekretario.

Kara Edward,

Kiam antaŭ kvin jaroj, ni staris ĉe la komenco de la ĵus naskiĝinta Flandra Esperanto-ligo, nur vi havis la kuraĝon akcepti la taskon de prezidanto de nia ligo, dum ni ĉiuj - aŭ preskaŭ - restis senpromesaj aŭ, por ĝin diri laŭ flandra maniero : "ĉiu sin tenis sur la ebenaĵo".

La defio estis granda, la estonto necerta kaj dubeca. Fakte ĉio estis farena : la organizado, administrado, la statutoj kaj diversaj regularoj. Kaj nur ni scias kion tio signifas : senfina, teda, temporaba, foje eĉ kritikalkorta, certe sen-dankhaviga laboro. Plie, la tereno devis esti ebenegita por certigi pacan kunvivadon kun la alilingvaj samlandanoj. Tio eĉ ne estis sendanĝera. Memoru ke unuaj battoj jam trafis nin en la vera komenco, ĝuste pro niaj trodoj trovi akcepteblan solvon por tiaj tiklaj prilingvaj problemoj.

Via saĝo, via kuraĝo, via realisma idealismo aŭ idealisma realismo tiam sinuis nin kontraŭ minacanta pereigo. Eble bone, ke tiu unua alfrontigo sin anoncis tiel frue, ĉar ĝi tuj metis nin antaŭ la realecon kaj donis al ni bildon de la homoj kun kiuj ni estis kunlaborantaj.

Dank'al vi, Edward, ni daŭrigis kadre de la sin altrudantaj cirkonstancoj. Dank'al vi ni adaptis nin al la situacio. Dank'al vi ni ne perdis kuraĝon, sed levis la batalganton, akceptis la defion ... obeis al la deziroj de nia membraro. Dank'al vi, Edward.

Kaj dum vi, per via saĝo kaj homkono, gvidis nin, mildigis tro striktan radikalecon, kuraĝigis kaj helpis, vi fervore defendis Esperanton kaj arde pledis por ĝi en oficialaj medioj. Vi sukcesis trarompri la barilon de la malinteresiĝo de la oficialuloj. Vi sukcesis meti ilin antaŭ la faktojn, meti eĉ ili la fingron sur la vundon. Vi devigis ilin aŭskulti kaj atenti pri la valoro de Esperanto. Per nekredbla entuziasmo, tiel lerte kaŝita malantaŭ trankvilu mieno, vi portis Esperanton tien, kie ĝi devas esti, metis ĝin antaŭ tiuj personojn kiuj finfine devas kundefidi rilate al la jes aŭ ne akcepto de Esperanto kiel komuna lingvo.

Krome, vi portis la ideon de komuna internacia lingvo eksterlanden, eksterkontinenten eĉ. En Afriko vi sukcesis konvinki homojn pri Esperanto. Dume vi agadis en UFA-medioj kaj vekis tie la intereson pri ĝenerala informado. Vi ellaboris laborplanon, ne nur por nia lando, sed por kiel eble plej ĝenerala uzado fare de aliaj landaj asocioj.

Senripoze vi laboradis kaj laboradas por prepari ĝeneralan informkampanjon

uzeblan ĝuste nun en la jubilea preparperiodo.

Certe, ankaŭ via edzino multe faris en tiu rilato, ne nur per sia toleremo pri via daŭra okupado por-Esperanta, sed ankaŭ akceptante nin ĉe vi hejme por okupi tie viajn ejojn dankumside kaj regalante nin ĉe-table. Sen ŝia afableco kaj bonvolemo vi verŝajne ne estus povinta tiel bone labori por nia komuna afero. Do, ankaŭ al ŝi nian sinceran dankon.

Edward, multon mi povus ankoraŭ diri, sed ĉion diri ne eblas, ĉar mi certas ke multon vi ankoraŭ faras sen menci, en silento, malantaŭ la kulisoj.

Kion mi jes povas fari estas substreki kion ni bezonas homojn kiel vi, kion necesa estas via daŭra okupiĝado pri nia ĉies afero, kion nenalhavebla estas via daŭra laboremo, via saĝo, via komprenemo, via milda firmeco, via bona ekzemplo.

Edward, ni admiras vin, fidas vin, petegas vin resti kun ni en nia baraktado, nia klopodado por finfine alporti al nia ĉies laboro la esperatan venkon.

Edward, eĉ se ekde nun vi portos la titolon de 'honora prezidanto', bonvolu ne konsideri tion kiel finon de via Esperanto-kariero, sed plue gastigu nin je via nesuperebla dediĉo, via nelaciĝebla laboremo, via amikeca, mildfirma decidpovo, via personeco.

Edward, por ĉio kion vi faris kaj faradas, por ĉio jes aŭ ne jam dirita, restas al mi nur unu esprimo, kiun mi volas eldiri nome de ni ĉiuj :

Koran dankon, Edward !

Povu nia danko persisti en tiu ĉi humila donaco kaj eternigi nian ĉies sinceran estimon.

Edward, multan dankon.

JB.

4. Eŭleto de nova estaro

Ekde nun prezidas Paŭl Peeraerts, Direktoro de Esperanto-Centro.

Post klarigo de la reguloj, akcentiĝas jenaj administrantoj, laŭgrupe : Ivo DURWAELE, Rosette VAN HERCK, Cecile LEUNTERS, (LVS, Antverpeno); Edward SYMONS (Erikejo - Kalmthout); Roger SAELS (Mechelen); Kristin TYTGAT (Mortsel); Emil VAN DAMME (Bruselo); Marie Thérèse HENQUINEZ (E° 2000 Leuven); Albert CLAESSEN (Hasselt); Albert MARMENOOT (Blankenberge); A. D'HULSTER (Bruĝo P.k.J.); Roland ROTSAERT (Bruĝo - Reĝa Societo); Cesar VANBIERVIJLIE (Kortrijk); Erik D'HONDT (Aalst); Arpad LÖDÖR (Gent); Leo CORIJNEN (St. Niklaas); Linda DE SCHEPPER (Hilrijk)

Kara Edward,

Kiam antaŭ kvin jaroj, ni staris ĉe la komenco de la ĵus naskiĝinta Flandra Esperanto-ligo, nur vi havis la kuraĝon akcepti la taskon de prezidanto de nia ligo, dum ni ĉiuj - aŭ preskaŭ - restis senpromesaj aŭ, por ĝin diri laŭ flandra maniero : "ĉiu sin tenis sur la ebenaĵo".

La defio estis granda, la estonto necerta kaj dubeca. Fakte ĉio estis farena : la organizado, administrado, la statutoj kaj diversaj regularoj. Kaj nur ni scias kion tio signifas : senfina, teda, temporaba, foje eĉ kritikala, certe sen-dankhaviga laboro. Plie, la tereno devis esti ebenegita por certigi pacan kunvivadon kun la alilingvaj samlandanoj. Tio eĉ ne estis sendanĝera. Memoru ke, unuaj batoj jam trafis nin en la vera komenco, ĝuste pro niaj - doj trovi akcepteblan solvon por tiaj tiklaj prilingvaj problemoj.

Via saĝo, via kuraĝo, via realisma idealismo aŭ idealisma realismo tian firmis nin kontraŭ minacanta pereigo. Eble bone, ke tiu unua alfrontigo sin anoncis tiel frue, ĉar ĝi tuj metis nin antaŭ la realecon kaj donis al ni bildon de la homoj kun kiuj ni estis kunlaborantaj.

Dank'al vi, Edward, ni daŭrigis kadre de la sin altrudantaj cirkonstancoj. Dank'al vi ni adaptis nin al la situacio. Dank'al vi ni ne perdis kuraĝon, sed levis la batalganton, akceptis la defion ... obeis al la deziroj de nia membraro. Dank'al vi, Edward.

Kaj dum vi, per via saĝo kaj honoro, gvidis nin, mildigis tro striktan radikalecon, kuraĝigis kaj helpis, vi fervore defendis Esperanton kaj arde pledis por ĝi en oficialaj medioj. Vi sukcesis trarompigi la barilon de la malinteresiĝo de la oficialuloj. Vi sukcesis meti ilin antaŭ la faktojn, meti ĉe ili la fingron sur la vundon. Vi devigis ilin aŭskulti kaj atenti pri la valoro de Esperanto. Per nekredibla entuziasmo, tiel lerte kaŝita malantaŭ trankvilu mieno, vi portis Esperanton tien, kie ĝi devas esti, metis ĝin antaŭ tiuj personojn kiuj finfine devas kundefidi rilate al la jes aŭ ne akcepto de Esperanto kiel komuna lingvo.

Krome, vi portis la ideon de komuna internacia lingvo eksterlanden, eksterkontinenten eĉ. En Afriko vi sukcesis konvinki homojn pri Esperanto. Dume vi agadis en UEA-medioj kaj vekis tie la intereson pri ĝenerala informado. Vi ellaboris laborplanon, ne nur por nia lando, sed por kiel eble plej ĝenerala uzado fare de aliaj landaj asocioj.

Senripoze vi laboradis kaj laboradas por prepari ĝeneralan informkampanjon

uzebilan ĝuste nun en la jubilea preparperiodo.

Certe, ankaŭ via edzino multe faris en tiu rilato, ne nur per sia toleremo pri via daŭra okupado por-Esperanta, sed ankaŭ akceptante nin ĉe vi hejme por okupi tie viajn ejojn dumkunsido kaj regalante nin ĉe-table. Sen ŝia afableco kaj bonvolemo vi verŝajne ne estus povinta tiel bone labori por nia komuna afero. Do, ankaŭ al ŝi nian sinceran dankon.

Edward, multon mi povus ankoraŭ diri, sed ĉion diri ne eblas, ĉar mi certas ke multon vi ankoraŭ faras sen menci, en silento, malantaŭ la kulisoj.

Kion mi jes povas fari estas substreki kion ni bezonas homojn kiel vi, kion necesa estas via daŭra okupiĝado pri nia ĉies afero, kion nenalhavebla estas via daŭra laboremo, via saĝo, via komprenemo, via milda firmeco, via bona ekzemplo.

Edward, ni admiras vin, fidus vin, petegas vin resti kun ni en nia baraktado, nia klopodado por finfine alporti al nia ĉies laboro la esperatan venkon.

Edward, eĉ se ekde nun vi portos la titolon de 'honora prezidanto', bonvolu ne konsideri tion kiel finon de via Esperanto-kariero, sed plue gastigu nin je via nesuperebla dediĉo, via nelacigebla laboremo, via amikeca, mildfirma decidpovo, via personeco.

Edward, por ĉio kion vi faris kaj faradas, por ĉio jes aŭ ne jam dirita, restas al mi nur unu esprimo, kiun mi volas eldiri nome de ni ĉiuj :

Koran dankon, Edward !

Povu nia danko persisti en tiu ĉi humila donaco kaj eternigi nian ĉies sinceran estimon.

Edward, multan dankon.

JB.

4. Flekto de nova estaro

Ekde nun prezidas Paŭl Peeraerts, Direktoro de Esperanto-Centro.

Post klarigo de la reguloj, akceptiĝas jenaj administrantoj, laŭgrupe : Ivo DURWAELE, Rosette VAN HERCK, Cecile LEUNTJES, (LVS, Antverpeno); Edward SYMOENS (Erikejo - Kalmthout); Roger SAELS (Mechelen); Kristin TYTGAT (Mortsel); Emil VAN DAMME (Bruselo); Marie Thérèse HENQUINEZ (E° 2000 Leuven); Albert CLAESEN (Hasselt); Albert MARMENOUT (Blankenberge); A. D'HULSTER (Bruĝo P.k.J.); Roland ROTSAERT (Bruĝo - Reĝa Societo); Cesar VANBIERVLIE (Kortrijk); Erik D'HONDT (Aalst); Arpad LÖDÖR (Gent); Leo CORIJNEN (St. Niklaas); Linda DE SCHEPPER (Milrijk)

Funkciuloj :

Paul PEERAERTS (Esp. Centro), Monique VEREECKEN (SONORILO), Anne TILMONT (EEC)
Andr e ORSOLINI (ĉefdeligito), Lambertine DREZE (APE), Ite TYTGAT (FLEJA)

Kooptitoj

Hilde VAN INGELGEM, Trees DOOMS, Jan BOVENDEERD, Marc VAN DEN BEMPT, Jan HANSEN,
Guido CLAESEN kaj Dirk DE VEERD.

NOVA ESTRARO

El tiuj administrantoj elektiĝas jenaj estraranoj (alfabete) :

Jan Bovendeerd, Erik D'Hondt, Trees Doods, Ivo Durwael, Edward Symoens kaj
Hilde Van Ingelgem.

El tiuj estraranoj la administrantoj elektas kiel novan prezidanton :

I v o D U R W A E L per 14 voĉoj el 17.

5. Instalado de la nova estraro - parolado de la nova prezidanto

Mi elkore dankas pro la fido kiun vi manifestis. Samtempe mi scias, ke mi ne plenumos ĉion, kion vi atendas de mi. Mi strebos al la plenumo de miaj aspireroj, sed mi devas ankoraŭ provi por trovi harmonion kun viaj aspireroj.

Pro tio mi volas klarigi mian bazan ideon pri la gvidlinio de nia ligo. Mi eluzas vian ĉeeston por trovi eĥon, ĉu aprobe, ĉu malaprobe.

La esenca celo de Esperanto estas trovi pli da harmonio kaj feliĉo por la homaro. Laŭ mi feliĉa homaro konsistas el aro da feliĉaj individuoj. Se iuj spertadas malfeliĉon pro Esperanto, se iuj naŭze forturnas sin de la movado, tio signifas ke okazis gravaj eraroj. Io tia ja ĉiam ripetiĝos pro la limigiteco kaj mankoj de la movadanoj. Sed mi almenaŭ volas fari konsciencesploron, ĉiam kiam tia homa drameto manifestiĝas.

Mi havas simplan difinon por feliĉo : mia kapablo por percepti, kompreni kaj digesti ĉion kio, sed precipe ĉiujn kiuj ĉirkaŭas min, por trovi harmonion inter mia kaj alies aspireroj.

Percepti ne nur signifas atente aŭskulti aliajn homojn, sed ankaŭ atenti pri signaloj ne vortigitaj.

Brilan ekzemplon donas S-ro Petro De Smedt. Lernanto de Esperanto volas rapide koni la lingvon, sed en la praktiko kutime ne havas la forton por plenumi tion. Neniu iam demandis al mi pri severa instruisto. Sed plej severa instruisto en Flandrio, nome Petro De Smedt, ankaŭ spertas plej fidelajn kaj dankemajn kursanojn.

En mia menso ne ekzistas manko da tempo : en ĉiu momento de nia moderna vivo prezentiĝas amaso da eblecoj. Se mi ĉiam elektas nur la plej taŭgan, me ne povus pli bone organizi mian vivon. Por mi ne tiom gravas la kvanton da laboro, sed kiun taskon mi elektas. Tiu sinteno implikas, ke mi faros multon por FEL, ĉar mi vigle interesiĝas pri ĝia forto, sed kelkfoje mi elektos ekz. por mia familio

malfavore al FEL. Ĉu miaj amikoj ankaŭ komprenos tion ?

Resume, do : trovi harmonion inter la estraranoj, administrantoj kaj membroj ŝajnas al mi pli grava ol la rezultoj de mia laboro. En la pasinteco mi ofte penadis por atingi ion. Nun mi volas strebi por atingi iujn.

Ĉu tia sinteno ne kondukos nin al tre amika sed fermita, stagnanta movado ? Pro spertoj en LA VERDA STELO, mi klare konsciigis ke amika rondo nur povas konservi sian viglecon se daŭre alvenas novaj vizaĝoj, ideoj, laborfortoj.

Tamen, la ekstera publiko ne unuavice estas allogata pro la etoso, sed pro praktikaj eblecoj de Esperanto. Ĉi-rilate mi admiras plurajn iniciatojn de Paul Peeraerts por prezenti FEL kiel servo-klubon. Poste tiuj novaj homoj ofte restas pro la spertita amikeco.

Do miaj ideoj estas : emfazi la amikecon por interna uzo kaj la 'komercigon' de FEL por la ekstera publiko.

Por fini mi volas ankoraŭ diri, ke mi tre longe hezitis ĉu kandidatiĝi por la estraro de FEL. Grava instigo estis la fakto, ke la nuna estraro konsistas el tiu agrabla rondo da amikaj homoj kiuj tiel bele kompletigas unu la alian kaj plenumas neforigeblan rolon.

En vi, Edward Symoens, mi admiras la sistemecon kaj profundecon de viaj laboroj kaj viajn altnivelajn kontaktojn. Vi restas neanstataŭebla en ministerioj kaj universitataj medioj.

En vi, Jan Bovendeerd, mi admiras la laborenergion, la entreprenemon, foje vian malpaciencon por ataki novan laborkampon.

En, Paul Peeraerts, mi admiras vian pragmatismen, vian unikajn informitecon kaj superrigardon, sed ankaŭ vian ĉiaman pretecon por labori eksterdejure.

En vi, Erik D'Hondt, mi admiras ke vi, kiel instruisto pri kemio, plonĝis en librotenaj problemoj kaj en minimuma tempo ellaboris planojn kaj taktikon por la sanigo de niaj financoj.

Hilde Van Ingelgem kaj Trees Doods, mi ŝatus trakti vin samtempe. Vi aldonis al la estraro de FEL etoson, pli homan vizaĝon !

En vi, Hilde, mi admiras la energion, la gajecon kaj la entuziasmon.

Trees, vi ŝajnas al mi la kontraŭpezo kontraŭ ioma dureco de viroj. Se viroj pli intenciĝas pri strukturoj kaj planoj, vi havas pli de atento por la homaj faktoroj.

En vi, Andr e Staes, mi admiras vian kapablon por klarvide, ion skeptisme taksati la situacion en niaj rondoj.

En vi, Kiki Tytgat, mi admiras vian fervoron por defendi la interesojn de la junularo.

Herman kaj Annie, vi havas epokfaran taskon. Post viaj mielmonatoj vi nun komencas ellabori la rebatan servon.

Sen Chris Declerck, unika pro siaj konoj pri lingvo kaj literaturo, FEL ne povus eldoni ion.

Wim De Smet, kun nekredbla energio, perlaboras sciencajn kaj politikajn mediojn.

Kaj Marc Van den Bempt, kiu bedaŭrinde ne volis eniri la estraron, restas tamen anarte menciinda kiel LA organizanto.

Ankaŭ la honora komitato restas inspiro por mi per ĉio kion ili realigis.

Ĝeamikoj de la Honora Komitato, la estraro, la administrantaro, karaj gembroj, fratiĝoj ĉiam estas eblaj inter homoj. Sed mi konstatis hodiaŭ unikan harmonion. Mia plej granda espero estas konservi ĝin. Klami mi rigardas en tiu ĉi salono, ĉiu el vi iel elstaras. Ŝajnas al mi, ke neniu el vi estas malhavebla !

Ivo Durwael.

Fino : 17.30 h.

JB.

55 55 818 / 54
09 / 20

PROTOKOLO pri la estrarkunsido de 07 04 1984 en Antverpeno

Ĉeestas : Erik D'Hondt (ED), Trees Dooms (TD), Ivo Durwael (ID), Paul Peeraerts (PP), Jules Verstraeten (JV) kaj Jan Bovendeerd (JB).

Petis senkulpigon : Edward Symoens, Kiky Tytgat kaj Hilde Van Ingelgem

Prezidas : ID

Protokolas : JB

Komenco : 10.15 h.

Antaŭ ol komenci la tagordon, la ĉeestantoj interkonsentas pri propono de JB estonte ne plu sendi invitojn kun tagordo, sed sekvi la laborkalendaron kaj kunmeti la tagordon en la kunsidoj mem. Tiel ni ŝparos po + BF 50,- ĉiun fojon el la afranko. Iu, kiu havas apartan punkton, sendu aŭ havigu ĝin al la koncerna(j) persono(j) por ke tiu(j) povu sin prepari.

T A G O R D O

1. La protokolo pri la estrarkunsido de 03 03 84 estas aprobita kun jenaj korektoj:
 - p. 8.1. : anst. 1982 legu 1981
 - p. 8.3. : anst. "FLEJA Preferas proponi...", legu "FLEJA NE preferas proponi ..."
2. Raportado pri plenumitaj taskoj.
 - 2.1.1. ES raportis telefone al JB, ke verŝajne okazos oficiala E°-kurso en VUB (Libera Universitato de Bruselo)
 - 2.1.2. Lia informado al la ministro pri instruado (Coens) ricevis favoran eĥon. La dosiero troviĝas nun ĉe la kompetentaj servoj, inter kiuj la Servo pri Rilatoj kun Eŭropaj Instancoj. ES klopodos akiri la nomon de la respondeculo de la servo ĉe EEK.
 - 2.1.3. ES skribis al M-ro Daelemans (Katolika instruado)
 - 2.1.4. Al PP ES informis ke li volas eldoni plian broŝuron de Cl. Piron : "Réponses al certaines questions sur l'Esperanto"

Li serĉas tradukanton. Ĉu la estraro aprobas la iniciaton ?

ID proponas eĉ meti la tekston en la "Manlibro"-n kaj, demandon post demando en ESPERANTO PANORAMA.

Aprobite.
 - 2.2.1. JB : lia alvoko en HEROLDE DE ESPERANTO kaj ESPERANTO de UEA, ricevis du respondojn, ambaŭ ne taŭgaj. Li faris novan alvokon.
 - 2.2.2. JB ne montras entuziaman kontenton pri KLUBO 100, konstatinte ke fakte ne multe okazas. Ekz. jam, krom en INFORMILO, en neniu alia bulteno aŭ informrevuo belga aperis ia ajn mencio pri la starigo de KLUBO 100. Plie, el la 13 ĝis nun pagintoj estas 2 Bruselanoj kaj 2 Valonoj, nome, tiuj kiuj persone ĉeestis la kunsidojn.
 - 2.2.3. Laŭ informoj ricevitaj, la ekzamenkomisiono povos disponi pri UEA-diplomoj/atestiloj.

2.2.4. JB skribis al UFE por anonci nian rezignon pri la plano eldoni nederlandlingve la broŝuron "Esperanto, rajto je komunikado" de UFE.

3. TASKODIVIDO

ID petas al ĉiu daŭrigi la funkcion kiun li/si jam okupas. Almenaŭ la ĉeestantoj akceptas.

4. TASKODIFINO- kaj amendumado

4.1. Informado : pro malĉeesto de ES, tiu ĉi punkto ne povas esti pritraktata.

4.2. Financoj (PP kaj ED)

4.2.1. La moment-bilanco montras ke la membrokotizoj ankoraŭ ne atingas la buĝetan sumon. Normale en marto la grupaj kasistoj ricevas listojn de la ne-repagintoj. Tio jam okazis por la kuranta jaro. Se ili ne reagas, ni mem sendas memorigon en aprilo. Tio ĉi ankoraŭ ne okazis.

4.2.2. Ekzistas kvanto de brokantaj verkoj. Ĝis nun oni sendis ilin al la biblioteko en Kortrijk. Ĉu ni daŭrigu tion aŭ ĉu ni klopodu "monigi" ilin al ID opinias ke ni devas fari distingon inter dokumentoj kaj literaturaĵoj. La dokumentoj (revuoj k.s.) estu senditaj al la biblioteko, la literaturaĵoj vendotaj.

4.2.3. Ŝajnas ke al Institucio Hodler mankas subvencipetoj.

JB faros peton pro la "Manlibro.." post ricevo de buĝeto, kiun preparos P.

4.2.4. L. De Bruyne faris atentokaptan prelegon pri Monda Turismo kaj anoncis vojaĝagentejon Beneluksan. Ĉu ne peti ilin por meti reklamanoncon en ESPERANTO PANORAMA ?

ED kontaktos L. De Bruyne por koni la adreson de la agentejo kaj skribos al ĝi.

4.2.5. Eldonejo SONORILO petis meti reklamanoncon en ESPERANTO PANORAMA en kiu ĝi konkurencas niajn prezojn venonte siajn librojn je vera kostoprezado, do, sen ia ajn gajno. Ĉu ni akceptu ?

Post diskutado decidiĝas, ke estonte, pro la fakto ke FEL havas sian propran libroservon, ne plu povas esti akceptitaj reklamanoncoj de konkurencaj libro-servoj. JB estas komisiita tiel skribi al SONORILO.

4.2.6. ID opinias ke ĉiuj proponoj estonte estu prikonsiderataj kadre de aŭ kun kostoprognozo.

4.2.7. P. De Smedt el Aalst volas presigi poŝt-hildkartojn en serioj de 6.

Li proponas vendi kiom eble plej multe en la kongreso en Aalst kaj lasi la reston al FEL je kostoprezado.

Aprobite.

4.2.8. Ekde 12 05 1984 komenciĝos la pentrad-laboroj de la malantaŭa fasado de la 'domo'. Kiel jam anoncite en la protokolo pri la ĝenerala jarkunsido, la ŝparota sumo estos disponigota al FEL.

4.2.9. LIBROSERVO

FLEJA petas kunvenon kun FEL-respondeculoj (ID, ED, PP, kaj IT, KT, WT) Kernu de FLEJA-estraro opinias oportune ke FEL aĉetu la FLEJA-stokon

kaj lasu al FLEJA la gajnon el sia propraj vendoj.

ID opinias ke aparta kunsido ne estas necesa kaj kontaktos la respondeculojn de FLEJA por enordigi la aferon.

La administraj praktikaj gvidadoj okazos en koncerto de ED kaj PP

4.2.10. Kongreso:

ED sendos subvencipeton al la ministerio pri kulturo.

4.3. Sekretariaj taskoj/problemoj.

Problemoj ne estas laŭ JB. Li jes konstatas, ke depost kiam FEL havas plu nur unu adreson, li apenaŭ ankoraŭ ricevas korespondadojn hejme. Normalaj ĉiutagaj informpetoj, kiuj ne postulas specialan atenton estas respondataj rekte de la Centro. La ceterajn li trovas en sia koresponda kesto en la klubejo ĉe LVS.

4.4. Ĝenerala informado :

Ni profitu de ESPERANTO PANORAMA kaj de ĝiaj flavaj paĝoj por informi la membrojn pri FEL.

ED donos la plej freŝajn novaĵojn pri la kongreso. JB estonte prizorgos la informadon pri FEL. Por la tuj-venonta numero PP jam zorgos.

4.5. Gazetara Servo :

PP atentigas ke antaŭe ĉiuj gazetetondadoj estis senditaj al E^o-centro, kiu uzis ilin por la rubriko "uitgeperst" en ESPERANTO PANORAMA. Nun la Gazetara Servo petas sendi ĉion al ili. Se tiel estos ekde nun, ni petu al Herman kaj Annie sendi la interesajn tekstojn al PP por publikigo.

4.6. Junularo :

FLEJA intencas eldoni informbroŝuron por la junularo kaj petas subvencion de FEL. ID opinias, ke la speciala numero de ESPERANTO PANORAMA povos tre bone servi por tio. Kvankam la informado estas ĝenerala, la akcento povos esti metita sur la junularo. Li do ne vidas kialon por subvencio.

4.7. Intergrupa agado :

Necese ŝajnas bone ellabori tiun ĉi servon, kiu fakte estas la ligo inter la estraro kaj la ĝenerala flandra movado. La estraro devas koni siajn grupojn kaj scii kio okazas.

ID proponas 1) orientigi pere de kontaktoj k. vizitoj, 2) instigi/sugesti kaj 3) realigi.

ID kaj HVI organizos la unuajn kontaktojn/vizitojn al kiuj partoprenos laŭeble ID kaj JB.

5. Diversaĵoj

5.1. Manlibro : verko tre valora sed al kies realigo mankas kunlaborantoj.

La estraranoj jam ek esploras kion ĉiu por si jam povos fari.

5.2. Laborkalendario : pro la kongreso de Eŭropa Klubo, la maja kunsido (05 05) okazos post-tagmeze ekde 14.00 h. Por la ceteraj kunsidoj, ni konservos la unuan sabaton de la monato ekde 10.00 h. Pri la julia kunsido estos decidite

en majo.

La estrarnoj, do, estas petataj bone sekvi la kalendaron kaj, okaze de dubo, informiĝi ĉe la sekretario.

Fino : 16.30 h.

JB

K L U B O 1 0 0

aliĝintoj ĝis nun :

1. Roland Rotsaert
2. Jules Verstraeten
3. Jan Bovendeerd
4. Marc Demonty
5. Stella Deweerd
6. Edward Symoens
7. Erik D'Hondt
8. André Mertens-Goossens
9. Hubert Audenaert
10. Marie Grela
11. Lambertine Dreze
12. Blanche Vermuyten-Lacroix
13. Gregoire Maertens.